

demandi," diris ĝentile la Loro. Alicio respondis avide, ĉar ĉiam ŝi estis preta paroli pri sia kara katinjo. "*Dajna* estas mia kato. Ŝi estas la plej bona muskaptisto kiun vi povus eĉ imagi; kaj se vi vidus ŝin *birdkaptanta*, . . ."

Tiuj vortoj kaŭzis inter la ĉeestantoj vere rimarkindajn sentojn. Kelkaj el la birdoj tuj forportis sin. Unu maljuna pigo tre zorge enfaldis sin per la vestoj kaj anoncis ke, ĉar la noktaj vaporoj malbone efikas sur la gorĝo, ŝi devas hejmeniĝi. La kanario kriis per trempepanta voĉo al siaj idoj: "Forvenu, karuletoj, la horo jam pasis, je kiu vi devis kuŝiĝi."

Pro diversaj tiaj pretekstoj ĉiuj foriris unu post alia, ĝis Alicio restis tute sola. "Se nur mi ne estus nominta *Dajna'n*!" ŝi diris melankolie. "Supre en la hejmo ĉiuj ŝatas ŝin, ĉi tie funde, neniue. Tamen, laŭ mi, ŝi estas la plej bona kato en la tuta mondo. Ho, *Dajna*, vi kara *Dajna*, ĉu jam neniam mi revidos vin?" Kaj nun sentante sin tre sola kaj tre malĝoja, ŝi denove ekploris.

Post iom da tempo, ekaŭdante kelkajn piedpaŝetaĵojn, ŝi avide direktis la rigardojn al ili, en la espero ke eble la Muso regajnis la bonhumoron kaj nun revenas por fini sian rakonton.

ĈAPITRO IV

ĈEFE PRI UNU LACERTO NO

ALVENIS ne la Muso, sed la Bl. Ĝi trotis malrapide, kaj ĉir kvazaŭ ĝi serĉas ion. Ŝi aŭdis ĝi si: "Ho, la Dukino, ho, miaj karmiaj felo kaj vangharoj! Ŝi ekz Tio estas same certa kiel la famamas la ĉasputorojn! Kie en la mi lasis ilin fali?"

Alicio tuj divenis ke ĝi serĉas kaj la paron da blankaj gantoj kaj ŝi bonkore komencis ĉirkaŭserĉi prosperis al ŝi trovi ilin, ĉar de ki en la lageto, ĉio absolute ŝanĝiĝis vitra tablo, la pordeto, kaj eĉ la mem. Baldaŭ dum Alicio ĉir Kuniklo rimarkis ŝin, kaj per ekkriis al ŝi: "Nu, Mariano, kie ĉi tie ekstere? Vi tuj kuru en alportu paron da gantoj kaj Rapidu, for!"

¹ Angla mallongaĵo, inter familianoj, p